Raporto pri IJK

La 51^a IJK okazis ekster Peterburgo en Rusio de la 31^a de julio ĝis la 7^a de aŭgusto 1995. Por tiuj, kiuj volis resti iom pli longe en Peterburgo, estis kaj antaŭ- kaj postkongreso en la granda urbo. Al Rusio vojaĝis du norvegoj por partopreni IJK por la unua fojo: Ulf Lunde kaj Espen Nystad.

Per ŝipo, trajno kaj buso ni finfine atingis la tre belan kongresejon en Serovo, apud la Balta Maro. Ĝi estis eksa tendumejo por sovetaj pioniroj, ege taŭga por IJK. Oni elektis sian propran lukson: La plej luksa loĝiĝo estis lito en 4-lita ĉambro, kaj la plej malmultekosta estis simpla rajto starigi tendon inter la arbustoj (ni nomis tion "la sovaĝejo").

Pri manĝoj zorgis la loka kongresa komitato (LKK): Ni ricevis manĝkuponojn por la tuta semajno je nia alveno. Malmanĝado estis iomete malpli bone prizorgita: Ĉe la plimulto de la necesejoj tute mankis pordoj! Sed kiam oni devas, oni devas! Do oni alkutimiĝis sidi surklozete tute videbla, kaj eĉ komencis interbabili kun la sidantoj sur la apudaj klozetoj.

La bieroj estis malmultekostaj, la ridoj estis malfirmaj, kaj la gastoj malnovaj kaj novaj amikoj. Entute la etoso estis preskaw nekredeble bonega, kaj post unu semajno ni sentis, ke ni vere konas unu la aliajn, ĉiuj 300! IJK devas esti la plej rekomendinda maniero rapide ekhavi bonajn amikojn de la tuta mondo!

La LKK laboregis, por ke ni havu bonegajn tagojn en Rusio. Kaj kia sukceso! Per kursoj kaj teatraĵoj ni sentis nin ĉiam aktivigataj. Per dancado (precipe La Bamba!) kaj kantado ni sentis nin ĉiam gajaj. Per koncertoj kaj ekskursoj ni sentis nin kaj bonvenaj kaj interesataj. Eĉ la vetero estis belega. Pluvis nur unu tagon, dum mi estis ekskursanta al la urbocentro.

Kun pluraj el la kongresanoj mi jam estis babilinta per Internet. Kun eĉ pli da ili mi estas veninte hejmen ekkorespondanta tra la reto. Dum la TEJO-komitatkunsidoj (la plej teda parto de la kongreso) ni formale decidis, ke ĉiu TEJO-estrarano ekde ĉi-jaro **devas** esti atingebla retpoŝte. Mi taksas tion grava decido, ĉar laŭ mia kompreno, **manko de komunikado** multe kulpas pri la lastatempaj problemoj de TEJO, unuavice koncerne Pasportan Servon.

IJK ne estas UK. UK estas formala, IJK neformala. UK temas tre multe *pri* Esperanto, IJK *per* Esperanto. Tamen, vi certe pli ampleksigas vian vortprovizon dum IJK ol dum UK, ĉar kiel rimarkis S-ro Mark Fettes, Ĝenerala Sekretario de UEA, en sia antaŭparolo en la kongresa libro: *"tiuj distriĝemaj gejunuloj [...] neologismas, skemismas, slangas kaj ĝenerale traktas la lingvon kvazaŭ ĝi estus normala!"*

Por rakonti pri ĉiuj miaj bonaj memoroj el la 51^a IJK, mi bezonus dudek kvin paĝojn anstataŭ unu! Kaj por rakonti pri miaj impresoj pri Rusio dum mia unua vizito en tiu granda lando, ankoraŭ dudek kvin paĝojn! Sed almenaŭ estu dirita la jeno: Kvankam ni multe bambis, umis kaj jeis, tio, kio okazis en Serovo dum tiu semajno estis io tre grava. Temas pri amikeco trans landolimoj, kaj tio tro mankas en la hodiaŭa mondo! Ni la partoprenintoj neniam povos forgesi tiun amikecon.

Raportis Ulf Lunde <`Ulf.Lunde@kvatro.no`>.

La nova TEJO-estraro

Danny ten Haaf (NL): Prezidanto.
Jorg de Mulder (BE): Landa Agado.
Jimmy S. Meyer (DK): Eksteraj Rilatoj
Jeroen Balkanende (NL): Ĝen. Sekr.
Marion Grosjean (CH): Kasisto.
Saskia Idzerda (NL): Kongresoj ktp.
James Rezende Piton (BR): Informado
Miguel Gomez y Besos (ES): Oficejo.

Venonta IJK:

Ĉiuj informoj pri la 52ª IJK (en Gütersberge, Germanio) troveblas en Internet je la jena adreso: *http://www.cs.tu-berlin.de/~wp/esperanto/treffen/ijk96.html.*

Kiel danci "La Bamba":

Dancantoj faras grandan rondon, kaj ĉirkaŭdancas la homojn en la mezo.

Centruloj laŭplaĉe elektas rondanon, trifoje kisas tiun (maldekstre, dekstre, maldekstre) kaj interŝanĝas lokon.

Ripetu. Variaĵoj ĉe la kisa parto eblas, indas, kaj endas.

Klarigis Duncan Thomson
<`duncan@lightning.eee.strath.ac.uk`>.